# Dana Fervojisto 2

*ISSN: 1397-9914*

**71a jareldono** **Novembro 2018**




Wels, septembro 2018 – FISAIC Festivalo kun Esperanto en la procesio tra la urbo. Fotis Vito Tornillo.

# La nova jaro 2019 – kion ĝi portos al DEFA?

Se vi diligente serĉas la malnovajn fine-de-la-jaro-DF-ojn, certe vi kelkfoje retrovos tiun titolon – kun la diferenco de jara cifero.

Sed, vere estas la demando ĉiujare – kion ni faris, kaj kion portos la nova jaro al ni?

La jaro 2018 kunportis multaj ŝanĝojn al la faka flanko de la IFEF-laboro – la flanko, kie ni metas niajn fortojn en tiuj jaroj, - ni solvas terminologiajn taskojn kaj verkas artikolojn kaj tiel kontribuas laŭ niaj ebloj kaj talentoj. Komence de la jaro malsaniĝis grave la sekretario de la Terminologia Sekcio Heinz Hoffmann, kaj jam en majo dum la kongreso en Pollando la Faka Komisiono – kaj IFEF - devis konstati, ke li ne revenos al la laboro. Neniu estas ne-anstataŭigebla, tion ni scias, sed levi la taskon post li estos granda defio. Oni okazigis fak-komisionan kunvenon, dum kiu ĉiuj bonaj voloj kaj ĉiuj ideoj reorganizi la laboron estis sur la tablo. Per komunaj fortoj ni antaŭeniros, - ni ne perdu la rezultojn atingitajn.

En tiu rilato mi vidas nian taskon por la venonta(j) jaro(j) – kiel eble plej bone kontribui al tiu laboro kun niaj amikoj kaj kolegoj en la diversaj landoj.

Mi deziras al ĉiuj membroj kaj legantoj feliĉajn decembrajn festotagojn kaj prosperan kaj enhavoriĉan Novan Jaron.

JUN

# *Intelliswitch* – trakforkoj kaj kruciĝoj

En iu ajn relsistemo la stato de kruciĝoj kaj trakforkoj estas ege grava. *Intelliswitc*h estas internacia projekto, kiu celas plibonigi sekurecon, fidindecon kaj vivlongecon de trakforkoj kaj kruciĝoj.

Ekde la printempo 2016 je trakforko en *Tommerup* (inter *Odense* kaj *Middelfart*, Fueno) estas instalita tre altivela mezur-ekipaĵo. Ĉiufoje, kiam trajno trairas la trakforkon, la aparato sendas informojn pri akcelado kaj moviĝoj (vibradoj) al DTU (Dana Teknika Universitato), kie oni prilaboras la multajn informojn. Kiam trajno trairas trakforkon, ĝi estas iomete ’uzita’, kaj se oni pli bone povas registri, kiel efikas la diversaj vagonoj, trajnunuoj, lokomotivoj, akceladoj kaj aliaj influoj, oni pli bone povas plani la prizorgadon de la trakforko.

Trakforko estas la plej multekosta parto de relsistemo, kaj pro tio tre gravas la projekto. Kompreneble oni ne povas instali mezurilojn je ĉiuj trakforkoj, sed helpe de la rezultoj de *Tommerup* oni povas multon kalkuli kaj prognozi por aliaj lokoj.







Bildotekstoj:
Bildo 1: ’Estas strangaj vibradoj en *Tommerup*
Bildo 2: Saltu, saltu!

La projekto estas grava ne nur por Danio, kaj ĝi allogas spertulojn de la tuta mondo - partoprenas la projekton kvar sekcioj de DTU, *Banedanmark* (dana rel-infrastruktura entrepreno) kaj sveda, nor-

vega, brita kaj aŭstra universitatoj. Ankaŭ por eduka celo homoj laboras ĉe *Intelliswitch*. Ekz-e *Rebeca Varghese Raju* en aŭgusto 2017 defendis sian disertacion *'Railway Ballast Health Monitoring Using Spectral Methods'* (Priskribo de sanstato de traka balasto uzante spektralajn metodojn) kun instruistoj kaj gvidantoj de la projekto.

Dum la 2017-a internacia konferenco de *Prognostics and Health Management Society* (La asocio pri diagnostiko kaj bontenado) *Intelliswitch* ricevis premion pro tiel nomata 'esplora papero', raporto pri la ĝisnunaj rezultoj de la projekto. La premio 'Plej bona esplora papero de la jaro' montras, ke la projekto bone survojas, kaj ke oni internacie agnoskas la problemaron, kiun *Intelliswitch* traktas. La internaciecon de la projekto montras ankaŭ la nomoj de la verkistoj de tiu esplora papero – *Pegah Barkhordari* venas de Irano, kaj *Alejandro de Miguel Tejada* naskiĝis en Hispanio.

DEFA

Fontoj: baneavisen 7/12-2017
http://www.intelliswitch.dk/, desegnis Lars Andersen



# Estontaj DEFA-kunvenoj

Ni spertis dum la lastpasintaj jaroj, ke la kondiĉoj kaj eblecoj vere ŝanĝiĝis. Ni ne povas plani regulajn renkontiĝojn, sed devas 'de unu kunsido al alia' interkonsenti pri kunestoj. Kiel ni menciis en la pasinta numero de Dana Fervojisto, kompreneble tiu maniero donas malpli bonajn eblecon por membroj, kun kiuj ni ne havas oftan kontakton.

Sed, informojn havas ĉiam la prezidanto, kaj ĉiuj estas bonvenaj kontakti lin. Skribu al li: niemann@kabelmail.dk

Niaj aktivecoj dum la somero estis malmultaj. En IFEF kaj precipe en la faklingva grupo okazis multaj ŝanĝoj – bedaŭrinde, oni devas diri, ĉar temas pri la sekretario de la terminologia sekcio, Heinz Hoffmann, kiu komence de la jaro grave malsaniĝis kaj nun vivas en flegejmo.

La Faka Komisiono jam dum la kongreso en Pollando en majo multe diskutis la novan situacion, kaj estis bona etoso, kaj ĉiuj samopiniis, ke per komunaj fortoj oni daŭrigu la laboron. Grave estas ne perdi la atingitajn rezultojn.

Sed, por tiel kaj tiom ŝanĝi labormanieron necesas tempo denove 'trovi siajn piedojn', kaj la Faka Komisiono en tiuj monatoj strebas fari tion.

# Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

## Kopenhago


***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: *Bent Jensenius,* tel 38 60 15 86, retadreso kek.informo1@gmail.com) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsve*j 35, 2400 *Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk


## Århus

***Kontaktulo pri DEFA*****:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade* 28, 1ª etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

## Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*




Du UEA-revuoj, certe multaj el vi per ili sekvas la evoluon.

# FISAIC-Festivalo en Wels, Aŭstrio

Komence de septembro okazis la unua plurdisciplina festivalo de FISAIC en la aŭsta urbo, kiu dum la lastpasintaj kvar jaroj vere lernis, kio estas FISAIC kaj ties laboro.

IFEF diskutas en tiuj jroj kiel atingi eblajn novajn membrojn. Dum la kongreso en Pollando en majo la estraro findecidis partopreni en Wels kun informbudo. La festivalo estis multekosta afero por partopreni, sed oni interkonsentis, ke estis unike ebleco por prezenti nin al kolegoj de la aliaj FISAIC-dsciplinoj.

Kaj la estraro kaj kelkaj helpantoj alvenis al la foira tereno en Wels kun multaj flagoj, afiŝoj, faldfolioj (en franca, germana kaj angla), libroj kaj bultenoj ...

Duhora streĉa laboro – kaj jen, la plej bela budo de la festivalo:




Nia bela budo ...

Niaj tri kunmetitaj tabloj troviĝis fakte en tre bona loko en la halo ... multaj partoprenantoj devis preterpasi nian budon survoje al la scenejo, kaj tio donis eblecon paroli al vere multaj homoj. Guido tamen devis batali iomete kun la filateilstoj por sekurigi nian lokon, sed kiam la animoj trankviliĝis, fakte fariĝis tre bonaj tagoj. Ni ankaŭ poste samopinias, ke estis unika ebleco montri nin kaj niajn eblecojn kaj ofertojn al kolegoj.

Origine la aranĝo en Wels estu muzika kaj korusa afero, sed antaŭ du jaroj ekestis la ideo inviti principe ĉiujn disciplinojn de FISAIC, kaj fine partoprenis preskaŭ 1.000 personoj de pli ol 50 grupoj kaj 10 disciplinoj.



La scenejo estis plena de fervojistoj la tutan tagon – jen pola koruso de Stargard

Krom la orkestroj, korusoj kaj folkloraj grupoj (la ‘kerno’ de la evento, oni povas diri) estis ekspozicio de modelfervojo, de fotoj, de pentraĵoj kaj de poŝtmarkoj, funkciis radioamatora stacio, filmo/video-grupo faris filmojn de la diversaj programeroj kaj intervjuis partoprenantojn ... kaj meze de la tuto estis ni! Unika ebleco!




La IFEF-prezidanto kaj -kasisto ĉe nia budo

La aranĝo daŭris kvar tagojn kun prezentoj en la granda halo kaj ankaŭ diversloke en la urbo. Ni, kiuj interŝanĝe gardis la budon, havis okazon ĉeesti kelkajn prezentojn kaj koncertojn. Estis granda travivaĵo, eble por ni precipe, ĉar en la dana FISAIC-sekcio ne troviĝas orkestroj kaj korusoj.

Dum la vesperoj de vendredo kaj sabato estis grandaj koncertoj en la urba koncertejo. Prezentis sin ĉiuj landoj kun unu, du aŭ eĉ tri grupoj, kaj estis tre interese ... estas granda diferenco de Norvegio kaj Grekio! La plej impona prezento estis verŝajne la orkestro FARO ... de la diversaj orkestroj fervojistaj en Aŭstrio oni kolektis la plej bonajn muzikistojn por ‘projekt-orkestro’ por nur tiu okazo. Nekredeble – oni ne povis kredi, ke temas pri amatoroj!



La FARO-orkestro

Kulminis la festivalo per komuna marŝo tra la urbo dum la dimanĉa antaŭtagmezo.  Nian parton vi vidas sur la frontpaĝo. Post griza vetero dum la antaŭaj tagoj la suno brilis de klara, blua ĉielo kaj donis la plej bonan kadron por la evento.



Dum la festivalo IFEF kaptis ls okazon okazigi estrarkunvenon. Nia fervojista movado alfrontas nun dum kelkaj jaroj malfacilaĵojn ... la membronombro malkreskas, ni ĉiuj maljuniĝas, kaj estas EGE mafacile allogi novajn, junajn fervojistojn al nia komunumo kaj nia laboro. Ni multfoje menciis tion – en ĉiu kongreso oni tion diskutas, kaj en diversaj landoj oni provis 'ĉion'. Kion fari?

Eĉ havi plenan, funkciantan estraron post la elektojaro 2019 ŝajnis dum certa tempo neeble, sed feliĉe solviĝis la afero, kaj ankaŭ pri kongresoj dum la venontaj jaroj ni estas 'surrele' ...

JUN+LEN





Du fotoj de la kongresejo/loĝejo de la 71a IFK venontjare ... la Domo Dioceza. Demandu al la redaktantoj pri informoj.

# La kanalo de Panamo sur reloj … la bi-oceana fervojo


Tiu projekto originas je la deziro en la regiono krei surter-transport-alternativon al la kanalo de Panamo – krei ion, kio havas saman signifon por la surtera transporto, kiel havas la kanalo por ŝipoj.

**La projekto**
”La bi-oceana fervojo” estos 3.755 km longa de la Atlantiko al la Pacifiko kaj ligos la du havenojn *Ilo* en *Moquegua* (Peruo) kaj *Santos* (Brazilo). Pro tio tiu projekto koncernas Brazilon, Bolivion kaj Peruon. Tamen ankaŭ oni priparolas alian, 1.000 km pli longan itineron, kiu ne tuŝos Bolivian terenon.

La projekto estis grava temo de la konferenco *III Gabinete Binacional Perú - Bolivia* en septembro 2017. La gvidantaroj de ambaŭ landoj esprimis tie denove intereson pri la projekto kaj volon realigi ĝin. Oni antaŭvidas, ke la realigo de la projekto kaŭzos fortigon de komerco kaj ekonomio en la tuta regiono.

Estas tre ambicia projekto kun var- kaj pasaĝertrajnoj; la potencialo estas ĉirkaŭ 10 milionojn da tunoj da vartransporto jare kaj ĉirkaŭ 6 milionojn da pasaĝeroj. La fervojo estos laŭ la plano preta en 2025.

**Itinero**
La fervoja koridoro havos kiel skribite longon de 3.755 km, De la tuta longo 340 km estos en Peruo, 1.521 en Bolivio kaj 1.894 en Brazilo.






La itinero – de Ilo al Santos

## Pleumo kaj financado

La prezidento de Peruo *Ollanta Humala* diris en novembro 2014, ke konstruado de fervojo inter Peruo kaj Brazilo, kiu ebligos komercan kunlaboron inter havenoj en la Atlantika kaj Pacifika regionoj, ne iros tra Bolivio kiel antaŭvidite de la tiea registaro. *Humala* diris, ke tiun grandegan projekton, planitan de la registaroj en *Lima* kaj Braziljo, li tuŝis dum sia plej lasta vojaĝo al Ĉinio kun la ĉinoj, kiuj montris grandan intereson partopreni la konstruadon kaj la financadon.

’Post provizora interkonsento kun Brazilo estas en Ĉinio subskribita memorandon eki studojn pri fervoja projekto, kiu ligos la du oceanojn kaj integros la merkatojn en Brazilo, Peruo kaj Ĉinio,’ diris *Ollanta Humala* dum kunsido kun eksterlandaj gazetoj kaj televidstacioj en la registara palaco.

Laŭ la analiza instituto *CCL* Peruo kaj Brazilo jam faris antaŭesplorojn, sed Bolivio ankoraŭ ne.

Por evluo de la fervoja koridoro oni prognozas investon de proksimume 15 miliardojn da USD. La vicprezidento de Peruo, ki-

u estas ankaŭ prezidento de la regiono *Moquegua*, *Martín Vizcarra*, kalkulis en novembro 2016, ke la investo, kiu estas postulata por tiu projekto, estis 13,5 miliardojn da USD, sed en marto 2017 oni alĝustigis la sumon al 15 miliardoj.

DB (la germana fervojoj) havas filion *'Engineering & Consulting',* kiu partoprenas german-svisan kunlaboron rilate al realigo kaj financado de la projekto.

La prezidento diris, ke la itinero de la fervojo ne estos en la suda parto de Peruo, sed en la norda 'pro naciaj interesoj', pri kiuj li ne plie klarigis. Bolivio volonte partoprenos kaj deziras fervojon, kiu povas kunligi la landon kaj ties produktojn kun havenoj ĉe ambaŭ oceanoj. Lige kun tio ekestis certa diplomatia 'frotado' inter la gvidantoj en *Lima* kaj *La Paz*, precipe post akuzo de la prezidento de Bolivio, *Evo Morales*, ke Peruo volas marĝenigi kaj izoli Bolivion. 'Mi ne scias, kion celas Peruo per sia kaprica ludo,' li lamentis.

*Ollanta Humala* respondis, ke li 'havas grandan respekton por prezidento *Morales*', kaj ke lia lando estas devigata al integriĝo kun Bolivio kaj subtenas ties historian postulon pri aliro al la maro.

En tiu rilato li referencis al 'alia fervoja projekto, kiu eliros de *La Paz*' kaj venos al *Lima* kaj aliaj havenurboj en Peruo. Li diris, ke la transportministroj de la du landoj havas kontakton pri tio. 'Estas teknika defio iri malsupren de la montaro al la marbordo,' diris *Humala*.

Intertempe oni detronigis *Humala*-n kaj enprizonigis lin, akuzita je korupteco. Ŝajne oni estas de la perua flanko nun sur pli pragmatika vojo kun *Pedro Pablo Kucynski* kiel prezidento.

DEFA

Fontoj: *DB Welt* oktobro 2017, Diversaj interretpaĝoj

# Je l' nova jar'

Samkiel sekrete,
mallaŭte, paŝete
suriras la teron
anĝel' de l' Sinjor',
alvenis la tago.
Ho, bonan matenon!
Ni diru bonvenon!
Alportu ĝi benon!
Jubilu la kor'!

En Li la komenco!
Per Lia potenco
moviĝas la tuta
stelar' super ni!
Vi, patro, Vi stiru!
Ja estas nenio
sen vi, kara Dio!
Al vi estu ĉio
lasita de mi!



Verkis *Eduard Möricke*,1804 – 1875
Esperantigis *Manfred Retzlaff*), 1982

**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Enggårdsvej 3, 1., lejl. 29
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venonta numero de Dana Fervojisto:

1/6-2019

## Enhavo:

paĝo 2 La nova jaro
paĝoj 3-4 *Intelliswitch*
paĝoj 5-6 Aktivecoj
paĝoj 7-11 FISAIC-festivalo
paĝoj 12-14 La kanalo de Panamo sur reloj
paĝo 15 Je l' nova jar'

## UEA kongresos 2019 en Nordio – Lahtio, Finnlando

La 104a universala kongreso okazos de la 20-a ĝis la 27-a de julio venontjare. Ĝis nun aliĝis jam preskaŭ 200 personoj el 38 landoj.